

# *Esperanto en Danio*

23-a jarkolekto • n-ro 3 • aŭgusto 2016



**La kongresejo en Nitra**

## Esperanto en Danio

membroorgano de  
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

### Adreso de la prezidanto:

Peter Wraae

Eremitageparken 17 st, C

2800 Lyngby

☎ 60 70 79 69 [peter@wraae.dk](mailto:peter@wraae.dk)

Ĝirokonto de DEA: 1551-805 7370

UEA-kodo: deaa-t

### Kromaj estraranoj:

Arne Casper Mortensen (kasisto)

Finn Østerbæk (vicprezidanto)

Jens S. Larsen (sekretario)

Bent Jensenius

Ileana Schrøder

### Redakcia adreso:

Jens S. Larsen

c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77

2770 Kastrup

☎ 52 64 44 72 [eed@esperanto.dk](mailto:eed@esperanto.dk)

### Presado:

DDFO

### Adresanĝoj al:

Finn Østerbæk ☎ 24 96 04 45

[finnoesterbaek@gmail.com](mailto:finnoesterbaek@gmail.com)

Represo de artikoloj el EeD estas  
permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

**01.11.2016**

## Enhavo

**Somero pasis – aŭtuno venos. .3**

**Internacia lingvopolitika**

**Konferenco.....4**

**Impresoj pri la UK en Nitra.....11**

**La Zagreba Metodo telefone...12**

**Scienco en Esperanto.....13**

**KEK: aŭtuna progamo.....14**

**Karavano al Seulo 2017.....17**

**Obama vizitis la urbon Hiroŝimo**

**.....18**

**Kio okazis rilate al nukleaj**

**aferoj?.....22**

**Kvalit-rekono por Esperanto-**

**instruado.....25**

## Somero pasis – aŭtuno venos



Ĵus pasis la 101-a Universala Kongreso en Slovakio, kaj kiel kutime bone organizita. Nitro havas grandan Esperantan komunumon, kaj estis armeo da helpantoj kiuj zorgis pri ni. Estis abundaj prelegoj, koncertoj, ekskursoj kaj aliaj eventoj, kaj kelkaj de la sciencaj prelegoj interesis multajn aŭskultantojn. Estis tre intensa semajno, multaj renkontiĝoj por homoj kiu dum plejparte de la jaro ne rekte rendevuas, sed kunlaboras per retaj iloj. Oni sentas tiom da vigleco, diligenteco kaj samtempe multe da ĝojo kiam amikoj resalutas.

Tio substrekas ke nia lingvo estas por ĉiuj – lingvistoj, idealistoj, sciencistoj, artistoj, katolikoj, budhanoj, kristinanoj, poŝtmarkkolektistoj, kuracistoj kaj pluraj aliaj grupoj, do, estas longa listo de malsamaj homoj kiuj havas saman celon, per komuna lingvo alproksimiĝi aliuloj sen limoj.

Preskaŭ en la fino de la kongreso, la estraro de UEA informis ke la kongresa urbo de 2018 estas Lisbono en Portugalio, kiu kompreneble donos al ni eŭropanoj facilan eblecon partopreni.

Slovakio fabrikas mutajn aŭtojn, kaj estis inĝeniero kiu dum prelego klarigis kiamaniere konstrui aŭton kiu povas flugi kaj li montris fotojn de ĝi – dum la flugado. Mirinde.

Nia movado kreskas en Afriko kaj Azio, sed UEA atendas okazigi kongresojn en Afriko, sed oni tre kontentas ke TEJO venontjare okazigos kongreson en tiu kontinento. La kialo de la atentado verŝajne estas la malluksaj kondiĉoj kiuj ne plaĉas al averaĝaj homoj, sed ne ludas rolon por junuloj.

*Peter Wraae*

## Internacia lingvopolitika Konferenco

*Dum la 10-a Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio en 2014, laŭ la peto de la estraro, la kongresanaro sendis rekomendon al UEA organizi Universalan Kongreson en Slovakio, kiu la 1-an de julio 2016 estis ricevonta la gvidadon de EU. Tiouokaze oni planis okazigi eventon por disvastigi Esperanton en unu el la gravaj Viŝegradaj landoj (Pollando, Ĉeĥio, Slovakio kaj Hungario).*

*La rekomendo estis pozitive akceptita de UEA, tial ni kongresis ĉi-jare en Nitra. Laŭ tiu plano oni organizis Internacian Lingvopolitikan Konferencon sub la titolo: "Perspektivoj de lingva komunikado en la Eŭropa Unio" dum la UK, la 28-29 de julio. Esperanto estis unu el la oficialaj lingvoj de la konferenco, kiu estis sinkrone interpretata.*

*La komisionano pri Sano kaj Nutraĵsekureco Vytenis Andriukaitis malfermis la konferencon kaj por la unua fojo en la historio de EU, membro de la Eŭropa Komisiono parolis ne nur **pri** Esperanto, sed **en** Esperanto, kaj ankaŭ enmetis la paroladon en sian blogon. Li lernis Esperanton antaŭ kvardek jarojn en Vilno. Jen lia rimarkinda ĉefparolado:*



Mi estas ravita esti ĉi tie en Nitra por tiu grava konferenco, kiu traktas lingvan komunikadon en EU, kaj mi dankas la organizantojn pro la granda laboro dum la pasinta jaro.

La tri temoj de la konferenco estas aparte aktualaj en la hodiaŭa Eŭropo. Ili estas civitana engaĝiĝo kaj multlingvismo; ekonomia integriĝo kaj multlingveco; kaj eduka inkludo per plibonigita lingvolernado. Eŭropa integriĝo estis foje kritikata kiel laŭdire tro malproksima de la civitanoj; ke ĝi okupiĝas pri la ekonomio anstataŭ pri la civitanoj; ke ĝi malsukcesis alparoli la civitanojn je profunda, emocia nivelo. La kresko de eŭrop-

skeptikaj politikaj movadoj en la lastaj jaroj povas grandparte esti sekvo de fortaj naciaj identecoj fronte al la eŭropa identeco, kiu estas malforta aŭ neekzistanta.

Civitanoj konsideras la multlingvisman politikon de EU malforta, ĉar en la praktika vivo ili estas ofte devigataj uzi en siaj kontaktoj kun EU-institucioj nur unu aŭ du regantajn lingvojn. Tio kondukas al kreskanta fremdiĝo de EU ĉe civitanoj kies lingvoj ne estas vaste uzataj de la EU-institucioj. Tia malegaleco devus ne ekzisti. Multlingveco estas kerna EU-valoro, ĉar ĝi estas reprezentata mem en la koro de la devizo de Eŭropa Unio: Unuiĝintaj en diverseco. La kvar liberecoj, kiuj staris en la centro de la eŭropa projekto ekde la komenco – la libera moviĝo de varoj, personoj, servoj kaj kapitaloj – ĉiuj implicas interŝanĝon inter parolantoj de malsamaj lingvoj, ĉu rektan ĉu helpe de profesiaj tradukistoj kaj interpretistoj. Fakte, ke ni ĉiuj malsamas, sed ni ĉiuj estas egalaj. Ĉiu lando havas sian propran kulturan identecon, malsamajn kulturajn minoritatojn kaj ofte ne nur unu oficialan lingvon, sed ankaŭ plurajn malsamajn fremdlingvojn ene de sia tereno. Kaj tiu bunteco igas nin malsamaj, sed ankaŭ egalaj, almenaŭ se temas pri niaj rajtoj kaj ŝancoj.

Multlingvismo estas esenca por certigi ne-diskriminacion en la traktado de EU-civitanoj, kaj por certigi ke ĉiuj lingvoj parolataj ene de EU, grandaj kaj malgrandaj; naciaj, regionaj kaj minoritataj lingvoj; estu respektataj kaj protektataj egale.

Ĉiu lingvo estas centra elemento de la identeco de sia parolanto. Proksimume 18% de la tuta EU-loĝantaro havas la germanan kiel sian gepatran lingvon; malpli ol 1% parolas la litovan, mian gepatran lingvon. Sed tio ne gravas por mi. La litova estas la lingvo kaj la pensmaniero, en kiuj mi kreskis; ĝi estas la unua paro de lensoj tra kiuj mi lernis rigardi la mondon.

Mi memorigu al vi, ke la Eŭropa Unio estas bela pacprojekto. En 2012 EU ricevis la Nobel-premion por paco pro antaŭenigado de paco, repaciĝo,



demokratio kaj homaj rajtoj en Eŭropo.

La multlingveco en EU povus kaj devus esti ekzemplo por strebado pri vivo en paco kaj diverseco. Ekzistas pluraj landoj, kiuj havas du aŭ tri oficialajn lingvojn, kiel Belgio, Finnlando aŭ Irlando, kompreneble. Kelkfoje ĉiu de tiuj lingvoj ludas malsaman rolon, sed mem la ekzisto de tia multlingveco estas evidenta esprimo de demokratio. Sekve, en la Eŭropa Parlamento kaj en la Eŭropa Konsilio ĉiuj 24 EU-lingvoj estas plene uzataj. En la Eŭropa Komisiono ni havas tri procedurajn lingvojn, sed multaj dokumentoj estas tradukataj ankaŭ en ĉiujn ceterajn EU-lingvojn.

Por konservi la lingvan diversecon en EU, ni en la eŭropaj institucioj multe uzas tradukadon. Kompreneble ne eblas traduki ĉiun dokumenton kaj ĉiun novaĵon, kiun publikigas la Eŭropa Komisiono, al 24 lingvoj. Tamen, la plimulto de la informoj, kiuj interesas la ĝeneralan publikon, kiel la portalo de Publika Sano kiun administras miaj propraj servoj, estas disponebla en ĉiuj aŭ plejparto de la oficialaj lingvoj.

Sed eĉ kun la ĉiam kreskantaj ŝancoj provizi facile kompreneblan informon al ĉiuj, ni daŭre memoru, ke la regado de aliaj lingvoj donas en konkurenca medio konsiderindan avantaĝon. Estas do grave, ke pluraj lingvoj estu instruataj en lernejoj. Lernantoj ankaŭ bezonas akiri pri-lingvajn kompetentojn kaj malferman sintenon al lingvoj, kiuj ebligas al ili daŭre disvolvadi siajn lingvokonojn dumvive.

Eŭropa Unio do finance subtenas lingvo-instruadon, kaj ĝi ankaŭ agnoskas la gravecon de lingva diverseco, subtenante la instruadon kaj de grandaj kaj de malgrandaj lingvoj. Ni helpas la Membroŝtatojn per aktivecoj de kunlernado, kiuj faciligas la interŝanĝon de bonaj praktikoj, por ke povu ekesti raportoj kiel tiu, kiun vi vidas ĉi tie, kaj financadon tra Erasmus+ kaj pluraj aliaj iloj.

La kunlaborado inter membroŝtatoj en la kampoj de lingva instruado kaj lernado estas ege bonvenigataj fare de la Eŭropa Komisiono. La kapablo

komuniki en pluraj lingvoj estas parto de la Ŝlosila *Competence Framework for Lifelong Learning*, kiun la Komisiono revizios kaj plifortigos kiel parton de la Agendo de Kapabloj kiu estis adoptita antaŭ nur iom pli ol unu monato.

Ĉiuj tiuj menciitaj mezuroj estas esencaj ĉar ili povas ne nur trakti la bezonojn de eŭropanoj kiuj venas de ŝanĝiĝanta socio, sed ili ankaŭ kontribuas al pli forta kaj pli proksima integriĝo. Ekzemple, la projekto MIME (Multlingvismo, Inkludo kaj Moviĝemo en Eŭropo) kiun kunordigas la Universitato de Ĝenevo kaj Profesoro François Grin, disponigas sciencan subtenon kun la celo montri, ke inkludo kaj moviĝemo estas plene kongruaj kun la hodiaŭa multlingva Eŭropo. Ni devas, do, daŭre antaŭenigi la plej bonajn praktikojn de lingvoeduko ĉie en EU.

Ni devas konsideri ankaŭ ĉiujn ilojn disponeblajn por atingi tiujn celojn. Do bonvolu permesi al mi daŭrigi mian paroladon per mia persona opinio pri alia afero, kiu estas tro ofte forgesata, sed povus esti same same grava – Esperanto.

Por mi persone Esperanto havas klaran ligon kun la lukto kontraŭ devigo. En la sovetia tempo la uzo de Esperanto estis protesto kontraŭ la reganta rusa lingvo, kiun oni devigis al ni uzi. En la disidenta movado mi proponis paroli Esperanton anstataŭe – kiel simbolo de humanismo kaj demokratio.

Do, kiel juna viro mi lernis tiun lingvon, ĉar mi estis inspirita de ties interna ideo, la idealo de mondo en paco. La instiga idealo de Doktoro Ludoviko Zamenhof, kiu iniciatis Esperanton, estas ofte miskomprenata: Paco, bazita sur egalaj rajtoj kaj justeco. Esperanto estas nur ilo, kvankam tre grava ilo, por helpi atingi tiun idealon. Tiu idealo interkroĉiĝas nete kun la celo de Eŭropa Unio, kiun oni foje priskribas kiel la plej sukcesan pacprojekton iam ajn. Ĝi alportis al la 28 EU-landoj la plej longan periodon de paco en la historio.

Kiel Umberto Eco iam skribis, la vivo de Zamenhof povas esti inspiro al ni. Li parolis multajn lingvojn flue, kaj estis tiel bona ekzemplo de mult-

lingvismo en praktiko, multlingvismo al kiu EU aspiras. Tamen lia tuta vivo estis regata de pasio defendi la egalan homan dignon de ĉiu homo, evitante ke fortuloj trudu siajn lingvojn al aliuloj. Li komprenis, ke tiu reciproka agnosko de egalaj homaj rajtoj de ĉiuj civitanoj endas por daŭra paco.

Interesa libro de Dr Ulrich Lins, *La Danĝera Lingvo*, priskribas la provojn de la reĝimoj de Hitlero kaj Stalino mortigi Esperanton. Hitler malamis tiun “artefaritan lingvon elpensitan de judo”, kaj mencias ĝin en *Mein Kampf*. Stalin komprenis ke la rekta internacia komunikado, kiun ebligas Esperanto, povus rapide subfosi lian propran propagandon. Ambaŭ reĝimoj murdis multajn esperantistojn, kaj oni povas diri, ke lingvo pro kiu homoj mortis, enradikiĝis en la homa historio kaj ne plu estas konsiderata kiel “artefarita”.

Mi ŝatus korekti iujn miskomprenojn pri Esperanto. Kelkaj foje diras: “Esperanto ne havas kulturon”. Tiuj, kiuj pensas tiel, estas tiom ligitaj al la ideo de nacia kulturo, al naciisma koncepto, ke ili ne kapablas imagi lingvon kies kulturo estus komuna al la tuta homaro. Tamen Esperanto havas ĉion kion havas la plej evoluintaj naciaj lingvoj – poezion, kantojn, teatron, fikcion kaj nefikcion, elstarajn tradukojn el la plej bona monda literaturo, verkatajn de denaskaj parolantoj de tiuj lingvoj. Esperanto dum sia preskaŭ 130-jara ekzisto kaj evoluo kreis sian propran riĉan originan kulturon al kiu kontribuas ĉiuj uzantoj el diversaj nacioj kaj etnoj de la mondo, kio fariĝis monda heredaĵo.

Esperanto estas multilate aliancano de malgrandaj lingvoj. Ĝi ebligas komunikadon tutplanede, tamen ĝia tre efika gramatiko kaj vortprovizo ebligas al homo ellerni ĝin tre rapide, en proksimume unu dekono de la tempo kiu necesas por ellerni iun ajn nacian lingvon. Krome, la propedeŭtikaj kvalitoj de Esperanto, kiuj estis ofte testataj en praktiko, akcelas kaj plibonigas la postan studon de aliaj lingvoj. Ĝia vortprovizo estas ĉefe hind-eŭropa, kaj ĝia sintakso havas multon komunan kun lingvoj



tiel diversaj kiel la finna, hungara, turka kaj mandarena ĉina. Ĝi estas tiel ideala lanĉilo por la studo de aliaj lingvoj. Tiu fenomeno estos diskutata pli detale dum nia konferenco.

La angla estas tre utila kaj disvastigita en la hodiaŭa mondo, sed ĝi neniam povas doni la egalecon en komunikado kiun donas Esperanto – kie ĉiuj akceptas lerni facilan, neŭtralan lingvon, kaj tiel evitas la imperiismon de unu nacia lingvo, kiu donas dumvivajn, nemeritatajn privilegiojn al denaskuloj, kaj maljuste metas la plimulton de la homaro en konstantan malavantaĝon. Eĉ la plej fervoraj Esperantistoj ne dezirus ke ĝi anstataŭu aliajn lingvojn. Zamenhof verkis poezion en sia denaska jida, kaj en la rusa, lia lingvo de studo. Li tradukis la tutan Malnovan Testamenton de la hebrea al Esperanto. Kiel poeto, Zamenhof plene konsciis la neanstataŭigeblan valoron de ĉiu homa lingvo. Per Esperanto, la literaturaj gemoj de mia litova, kaj aliaj malgrandaj lingvoj kiel la hungara, la kroata kaj la slovaka, trovis sian vojon al la ĉina kaj japana, kaj tiel kontribuas al la internacia kompreno kiu estas esenca por paco.

Ene de EU, rolo por Esperanto povus helpi plifortigi komunan eŭropan identecon, kaj tiel igi EU pli efika en ties rolo de laboranto por paco en Eŭropo kaj en la tuta mondo. EU kaj Esperanto komune havas engaĝiĝon al paco, al justeco kaj al ne-diskriminacio. EU tute ne konscias la vastan potencialon de Esperanto por pliproksimigi civitanojn al la eŭropa integriĝo, kaj unu al la alia. Plibonigita lingva komunikado povus multe lerni de la ĝenerala progreso de la eŭropa integriĝo, bazita sur la ideoj de Robert Schuman kiel unue esprimitaj la 9-an de majo 1950: “Eŭropo ne fariĝos subite, aŭ laŭ unu sola plano. Ĝi estos konstruita tra konkretaj atingoj, kiuj unue kreas faktan solidarecon.”

Simile Esperanto ne progresos subite, sed tra la libervolaj decidoj de kelkaj membroŝtatoj por doni al ĝi lokon en siaj instruplanoj, komence kiel helpilo por lingvolernado ĝenerale. La 4 Viŝegradaj landoj havas idealan pozicion por fari tiun unuan paŝon, en la kadro de sia jam bone evoluinta

kunlaboro en aliaj kampoj. Mi esperas ke la Nitra konferenco, konstruante sur la Bratislava konferenco de 2006, ludos gravan rolon en la fortigado de multlingvismo kaj en la certigo de praktika uzo de ĉiuj niaj lingvoj. Ni neniam forgesu, kio estas la komuna celo de Esperanto kaj Eŭropa Unio – PACO.

---

*Rimarkoj de Zlatko Tisljar:*

Necesas nepre informi, ke s-ro Andriukaitis ne nur faris belan parolon, sed akceptis ankaŭ la delegitaron de EEU (Sean Ó Riain, Jozefo Reinwart kaj Zlatko Tišljár) posttagmeze samtage kaj interparolis dum pli ol unu horo. Li klarigis kion faru EEU por ke Eŭropa Komisiono povu entrepreni ion por la utilo de Esperanto. Ni kompreneble sekvos liajn konsilojn kaj kunlabore kun li entreprenos pliajn paŝojn.

Mi invitas legi la paroladon sur lia paĝaro (<https://ec.europa.eu/commission/2014-2019> – kiu estas ankaŭ senprecedenca, ke sur la oficiala paĝaro de Eŭropa Komisiono aperas teksto en Esperanto) kaj klaki sube al la komentoj kaj sendi kelkajn subtenajn vortojn.



*Arboplantado komune entreprenata de la ĝenerala sekretario de UEA Martin Schaeffer, prezidanto de la Loka Kongresa Komitato Peter Balaž kaj prezidanto de UEA Mark Fettes. Spektas kongresanoj.*

## Impresoj pri la UK en Nitra

Nitra estis surprize ĉarma urbo, kun multe da verdaj kvartaloj, precipe ĉe la kongresejo kiu okazis en la Slovaka Agrikultura Universitato kun ege taŭgaj kunsidaj ĉambroj. Ĉan ni kongresis en pli malgranda urbo ol kutime, la kongresanoj estis ege videblaj, ankaŭ pro la fakto, ke pluraj aranĝoj okazis ekster la kongresejo, en la urba placo, kiel la Nacia Vespero kiu okazis dimaĉe, kaj la Manifestado, dum la lasta kongresvespero, kiam la kongresanaro piediris de la kongresejo al la urba placo en festa etoso, por spekti la Internacian Muzikfestivalon.



Pri la organiza laboro mi povas informi ke, ĉar 2016 estas elekta jaro, la komitato kunsidis fojon pli ol kutime interalie por elekti novan estraron. Krome, la estraro proponis ŝanĝojn en la statuto de UEA, ĉar la junulara organizo TEJO deziris sendependiĝi de UEA, por simili al la aliaj junularaj organizoj kun kiuj ili kunlaboras. Alia ŝanĝo en la statuto de TEJO, kiu estas jam aprobita de TEJO dum ilia kunveno antaŭ la UK, estis la propono ke la junuloj povas daŭrigi sian membrecon ĝis 35 jaroj, anstataŭ kiel ĝis nun, kiam la limdato estas 30 jaroj. Tiu ŝanĝo havas kompreneble ankaŭ influo al la statuto de nia junulara organizo DEJO.



Krom la centoj da prelegoj dum la semajno, alia grava evento estis la internacia lingvopolitika konferenco kiu daŭris 2 tagojn, pri kiu vi povas aparte legi la paroladon de la europa komisionano Vytenis Povilas Andriukaitis. La partprenantoj estis multaj universitataj profesoroj kie Esperanto estis uzata kiel pontolingvo helpe de sinkrona interpretado, kune kun angla kaj slovaka lingvoj.

*Ileana Schröder*

## **La Zagreba Metodo telefone**

Sinjoro Georg Jaehnig (germano loĝanta en Malajzio) ellaboris ĉi tiun portalon kaj kun la permeso de la ZM-aŭtoroj ĝi estas libere uzebla inkluzive de la aplikaĵo por telefonoj. Ĝi funkcias en la germana, angla, franca, hispana, ĉina kaj malajzia.

12 lecionoj lerneblaj dum 12 tagoj kaj atingeblaj en preskaŭ ĉiuj plej grandaj lingvoj de la mondo ĉe: <http://learn.esperanto.com/de/>.

*Zlatko Tišljar*

## Scienco en Esperanto

En la numero de Septembro 2015 de la revuo Esperanto, Internacia Scienca Asocio Esperanta (ISAE) anoncis sian baldaŭan reformon. Depost kelkaj semajnoj, la aliro al Scienca Revuo iĝis tute senpaga! Oni rememorigas vin ke SR estas regule eldonata jam de pli ol 60 jaroj. Vidu la lastan numeron ĉe <https://sciencia-revuo.info>. Plie la rete arkivita kolekto de Scienca Revuo 1949-2011 estas ankaŭ alirebla senpage. Tio estas fonto de faka vortprovizo kaj terminologio pri diversaj sciencoj.

En nia revuo aperas kontribuaĵoj pri pluraj sciencaj fakoj, ofte je profesia nivelo, sed ĝis nun ne abundis artikoloj pri sciencaj aktualaĵoj por kleraj legantoj. Tial ISAE ĵus lanĉis sian blogon ĉe <https://aktuale.sciencia-revuo.info>. Ĝia celo, krom informi pri sciencaj novaĵoj per oftaj artikoloj, estas ankaŭ teni la sciencemulojn informitaj pri la vivo de ISAE. Plie, ISAE baldaŭ havos sian fejsbukan profilon! Per tiu paĝo, niaj legantoj povos sin informi pri sciencaj aktualaĵoj kaj sociaj implicoj rilate al la sciencoj, eĉ per nacilingvaj artikoloj spikumitaj sur la reto. Esper-eble, la plureco de fontoj alportos buntan vidpunkton pri la scienca kampo.

Per fejsbukoj kaj la blogo de ISAE, la legantoj povos ankaŭ doni siajn impresojn pri la enhavo, sugesti subjektojn kiujn ili ŝatus legi ĉe Scienca revuo kaj eĉ mem kontribui. Tiel ISAE ŝatus pli bone respondi al legantaj atendoj.

## KEK: aŭtuna progamo

Konversacia Esperanto-Klubo kunvenas **ĉiulunde je la 19-a horo** en la “Kulturdomo” Tomsgårdsvej 35, 2430 Kopenhago NV. Bonvolu eniri la kulturdomon per la pordo ĉe la aŭto-parkejo.

Prepare al la 100-jara datreveno de la morto de Zamenhof venontjare, ni havos **monatan Zamenhofan Vesperon**. Ni legas prelegojn kaj leterojn de Zamenhof kaj diskutas pri ili.

15. aŭgusto: Ni parolas pri la ĵus pasinta UK in Nitro.

22. aŭgusto:

Jimmy Stryhn Meyer, kiu laboras kiel juristo ĉe la Kortumo de Europa Unio, gastos nin. Li pretas respondi demandojn pri EU. Bonvolu elpensi taŭgajn demandojn por tiu vespero.

29. aŭgusto: **Zamenhofa Vespero**. “La Terglobo estas la Lando de Esperantistoj”. Gvidas Ana.

5. septembro: Studgrupo. Paŝoj al plena posedo de William Auld. Jen la unua paŝo. Betty gvidas.

12. septembro: **Zamenhofa Vespero**. Komparo de “Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Internacia Lingvo” kaj “Hilelismo”. Gvidas Jens.

19. septembro: Duolingo – La nova “miraklo” por Esperanto.

Pli ol 400.000 personoj jam lernas Esperanton per ĝi. Kiel ĝi funkcias kaj kiamaniere ni povas kontakti la lernantojn en ĝi? Ĉiuj uzantoj (de iu ajn lingvo) estas bonvenaj disigi siajn spertojn al ne-uzantoj kaj ne-sciantoj.

26. septembro: Babila Vespero. Venu babili pri ĉio kaj nenio.



3. oktobro: Danlingva radioprogramo (kun Robert Phillipson kaj aliaj).

Ni aŭskultas kelkajn minutojn kaj surbaze de tio diskutas esperantlingve. Gvidas Bent.

10. oktobro: Studgrupo. Paŝoj al plena posedo de William Auld. Jen la dua paŝo.

*La 17-an de oktobro pro la aŭtuna ferio ne okazos kunveno.*

24. oktobro: **Zamenhofa Vespero.** Gvidas Ileana.

31. oktobro: Danlingva radioprogramo (kun Robert Phillipson kaj aliaj).

Ni aŭskultas kelkajn minutojn kaj surbaze de tio diskutas esperantlingve. Gvidas Bent.

7. novembro: Studgrupo. Paŝoj al plena posedo de William Auld. Jen la tria paŝo. Betty gvidas.

14. novembro: Babila Vespero. Venu babili pri ĉio kaj nenio.

21. novembro: **Zamenhofa Vespero.** Pri lia juda fono. Gvidas Betty.

28. novembro: Peter Wraae prelegos pri Martinus.

5. decembro: Studgrupo. Paŝoj al plena posedo de William Auld. Jen la kvara paŝo.

*Informoj pri la Zamenhoffesto la 10-an aŭ 11-an de decembro sekvos.*



*La 22-an de junio kelkaj kopenhagaj esperantistoj vizitis Ana Røssum en Vanløse kaj promenis al la tombo de Ivo Lapenna (1909–1987), tuj trans la municipa limo en Rødovre.*

*Lapenna estas konata kiel “la konstruinto de la moderna UEA”. Maldekstre vidiĝas la tomboŝtono kaj sube Ana rakontas pri Lapenna al la kunvenintoj. Suna vetero garantiis agrablan kunestadon.*



## Karavano al Seulo 2017



Korea Esperanto-Asocio invitis UKon-102 de 2017 jaro en Seulo, Koreio. Kaj “La Vojaĝo” (<http://vojagxo.info/>) anoncas novan projekton — Karavanon al Seulo por partoprenantoj de la planata kongreso. Niaj gvidistoj bone parolas esperante, profesie ĉiĉeronas kaj havas sperton ne nur de trajna vojaĝo, sed ankaŭ someraj kaj vintraj vojaĝoj en sovaĝa naturo. Ni havas sperton de vojaĝoj en diversaj landoj de tutmondo, precipe en Azio, do nia nova itinero ne estas hazarda por ni.

Laŭ anticipa plano ĝi itineros laŭ la fama Trasiberia fervojo (9298 km), la plej longa fervoja itinero en la mondo. Laŭ la baza plano la Karavano startos en Sankt-Peterburgo, trapasos nordon de eŭropa parto de Rusio, Uralon, Siberion, vastan azian parton de Rusio preter urboj Vologda, Kirov, Perm, Jekaterinburg, Tjumen’, Omsk, Novosibirsk, Krasnojarsk, Irkutsk, Ulan-Ude, Ĉita, Blagoveŝĉensk, Ĥabarovsk al Vladivostoko sur la Pacifika marbordo. El Vladivostoko ni veturos al Koreio per pramo aŭ per aviadilo.

Certe, dum tempo, kiu restas ĝis la Karavano, ĝia itinero povas esti ŝanĝita. Eventuale ni povas vojaĝi trajne nur ĝis lago Bajkalo, restos tie ĉi kaj turnos nin al ĉefurbo de Mongolio — Ulanbatoro, kaj poste veturos al Pekino, Ĉinio. El Ĉinio ni veturos al Koreio per pramo aŭ per aviadilo. Pritakso de ambaŭ itineroj kaj voĉdonado estas organizota en nia retejo. Atentu ke ni nun pretigas vojaĝon kaj ĉiu pli detala informo aperos tie baldaŭ, do ne evitu vizitu la paĝon denove por ricevi aktualan informon.



## Obama vizitis la urbon Hiroŝimo



*Hori Jasuo el Japanio tradukis la paroladon kiun eldiris usona prezidento Barack Obama en sia vizito al Hiroŝimo pasintan majon.*

Antaŭ sepdek unu jaroj, en serena, sennuba mateno, morto falis de la ĉielo kaj la mondo ŝanĝiĝis. Ekbrilo de lumo kaj muro de fajro detruis la urbon kaj montris, ke la homaro posedas la rimedon por sin detruiri.

Kial ni venas al tiu ĉi loko, al Hiroŝimo? Ni venas por pensi pri la terura forto elĉenigita en ne tiel fora pasinteco. Ni venas ĉi tien por prilamenti la mortintojn de pli ol cent miloj da japanaj viroj, virinoj kaj infanoj, miloj da koreoj kaj dekduoj da usonaj militkaptitoj. Iliaj spiritoj parolas al ni. Ili petas, ke ni introspektu kaj taksu, kio ni estas kaj kio ni povu fariĝi.

Estas ne la fakto de la milito, kiu elstarigas Hiroŝimon. Artefaktoj montras al ni, ke violenta konflikto aperis inter tre fruaj homoj. Niaj prauloj, lerninte fari klingojn el siliko kaj lancon el ligno, uzis tiujn ilojn ne nur por ĉasado, sed ankaŭ kontraŭ sia propra specio. En ĉiuj kontinentoj la historio de civilizacio

estas plena de milito, pro manko de nutraĵoj aŭ avido je oro, aŭ pro ŝovinista febro aŭ religia fervoro. Imperioj leviĝis kaj falis, popoloj estis subjugigataj kaj liberigataj, kaj en ĉiuj vojkrucoj sennombraj, senkulpaj homoj viktimiĝis, kies nomoj dume estas forgesitaj.

La mondmilito, kiu atingis la brutalan finon en Hiroŝimo kaj Nagasaki, estis batalo inter la plej riĉaj kaj plej fortaj landoj en la mondo. Iliaj civilizacioj donis al la mondo grandajn urbojn kaj belegan arton. Iliaj pensuloj antaŭenigis ideojn de justeco, harmonio kaj vero. Tamen la milito estiĝis de la sama, baza instinko por superregado aŭ konkerado, kiu kaŭzis konfliktojn inter la plej simplaj triboj, malnova modelo pliigita de novaj kapabloj kaj sen nova limigo.

Dum kelkaj jaroj de la milito mortis 60 milionoj. Viroj, virinoj, infanoj, ne malsamaj kiel ni, estis pafataj, batataj, pelataj, bombataj, enprizonigataj, malsanigataj aŭ gase venenigataj al morto. Troviĝas multaj lokoj en la mondo, kiuj kronikas tiun militon, multaj memoraĵoj, kiuj rakontas pri kuraĝo kaj heroismo, kaj multaj tomboj kaj vakaj koncentrejoj, kiuj eĥas neesprimeblan moralan ruinion.

Tamen, la imago de la funga nuboj, kiu leviĝis en ĉi tiun ĉielon, nin plej akre rememorigas pri homara kerna kontraŭdiro. Ĝuste tiu sparko, kiu markas nin kiel specio, niaj pensoj, niaj imagpovoj, niaj lingvoj, nia ilo-farado, nia kapablo apartigi nin de la naturo kaj konformigi ĝin al nia volo, ĝuste ĉio tio ankaŭ donas al ni kapablon de nekredebla detruado.

Kiel ofte materia antaŭenigo aŭ socia novigo blindigas nin al tiu vero, kiel facile ni lernas pravigi violenton en la nomo de iu pli alta motivo? Ĉiuj gravaj religioj promesas vojon al amo, paco kaj justeco, sed neniu religio estas libera de kredantoj, kiuj postulas ilian kredon kiel licencon por mortigo.

Nacioj leviĝas, rakontante rakonton, kiu ligas la popolon kune en sinofero kaj kunlaboro, ebligante rimarkindan atingon, sed tiuj samaj rakontoj estas tre ofte uzataj por premi kaj malhumanecigi tiujn, kiuj estas malsamaj.

Scienco ebligas al ni komunikadon trans maroj kaj flugadon super nuboj, kuracadon de malsanoj kaj komprenon pri la kosmo. Sed tiuj samaj eltrovoj povas esti transformitaj en multe pli efikajn mortigajn maŝinojn.

La militoj de la moderna epoko instruas tiun veron, Hiroŝima instruas tiun ĉi veron. Teknika progreso sen ekvivalenta progreso en homaj institucioj povos pereigi nin. La scienca revolucio, kiu kondukis al la fisio de atomo, postulas ankaŭ moralan revolucion.

Tial ni venis ĉi tien. Ni staras ĉi tie, meze de la urbo, kaj provas mem imagi la momenton de la bombo-falo. Ni provas mem senti la teruron de infanoj konfuzitaj de tio, kion ili vidas. Ni aŭskultas silentan krion. Ni rememoras ĉiujn senkulpulojn mortigitajn dum tiu terura milito, kaj la militojn, kiuj venis antaŭe kaj la militojn, kiuj sekvos.

Simplaj vortoj ne povas doni voĉon al tiuj suferadoj, sed ni havas komunan respondecon rekte rigardi en la okulojn de la historio kaj demandi, kion ni devas fari malsame por bridi tian denovan suferadon. Iun tagon la voĉoj de la *hibakuŝa* (atombombitoj) ne plu estos kun ni por transdoni ateston. Sed la memoro de la mateno de la 6-a de aŭgusto 1945 devas ne velki. Tiu memoro ebligas al ni batali kontraŭ memkontento. Ĝi instigas nian moralan imagpovon kaj ebligas al ni ŝanĝon.

Kaj ekde la fatala tago, ni faris elektojn, kiuj donas al ni esperon. Usono kaj Japanio forĝis ne nur aliancon, sed ankaŭ amikecon, kiu donis multege pli por niaj popoloj, ol ni povus ricevi tra milito.

La nacioj de Eŭropo konstruis union, kiu anstataŭigis batalecampojn per ligoj de komerco kaj demokratio. Subpremataj popoloj kaj nacioj akiris liberecon. Internacia komunumo establis instituciojn kaj traktatojn, kiuj funkcias por eviti militon kaj aspire restrikti kaj redukti kaj finfine elimini la ekziston de nukleaj armiloj.

Tamen, ĉiu ago de agreso inter nacioj, ĉiu ago de teruro, koruptado, kruelo kaj opreso, kiujn ni vidas en la tuta mondo, montras, ke nia laboro estos neniam plenumita.

Ni ne povos elimini la homan kapablon fari malbonon, tial nacioj kaj la alianco, kiun ni establis, devas posedi rimedojn por defendi sin. Sed inter tiuj nacioj kiel la mia, kiuj posedas nukleajn stokajojn, ni devas havi kuraĝon por eskapi el la logiko de timo kaj serĉi mondon sen ili.



Ni ne povos efektiviĝi tiun celon dum mia vivo, sed persista klopodo povas redukti la eblecon de katastrofo. Ni povas mapi la vojon, kiu kondukas al nuligo de tiuj stokaĵoj. Ni povas haltigi ilian disvastigon al novaj nacioj kaj teni pereigajn materialojn sekuraj for de fanatikuloj.

Sed tio ankoraŭ ne estas sufiĉa, ĉar ni vidas ĉirkaŭ la hodiaŭa mondo, kiel krudaj fusiloj kaj barelaj bomboj povas kaŭzi violenton en terura skalo. Ni devas ŝanĝi nian pensmanieron pri milito, por preventi konflikton per diplomatio kaj strebi por fini konfliktojn, post kiam ili komenciĝis, por vidi nian kreskantan interdependon kiel kaŭzon por paca kunlaboro kaj ne kiel kaŭzon por violenta konkurenco, kaj por difini niajn naciojn ne per nia kapablo de detruado, sed per tio, kion ni povas konstrui.

Kaj antaŭ ĉio, ni devas reimagi nian reciprokan ligiĝon kiel membroj de unu homa specio, ĉar ankaŭ tio igas nian specion originala. Ni ne estas ligitaj de nia gena kodo por ripeti la erarojn de la pasinteco. Ni povas lerni. Ni povas elekti. Ni povas rakonti al niaj infanoj malsaman rakonton, tiun kiu priskribas komunan homaron, tiun kiu igas militon malpli probable kaj kruelecon malpli akceptata.

Ni vidas tiujn rakontojn en la *hibakuŝa*, la virino, kiu pardonas la piloton, kiu flugis kaj faligis atombombon, ĉar ŝi rekonis, ke kion ŝi vere malamas, tio estas milito mem. La viro kiu serĉis familiojn de usonanoj mortigitaj ĉi tie, ĉar li kredis ke ilia perdo estas egala kiel la lia.

Mia nacia rakonto komenciĝis kun simplaj vortoj: “Ĉiuj homoj estas kreitaj egale, kaj dotitaj de nia Kreinto kun neforigeblaj rajtoj, inkluzive de vivo, libereco kaj serĉado de feliĉo.” Efektiviĝi tiun idealon ne estas facile, eĉ en nia propra lando, eĉ inter niaj propraj civitanoj. Sed esti lojala al tiu rakonto indas je klopodo. Ĝi estas idealo, kiun oni devas strebi, idealo, kiu disvastiĝas trans la kontinentoj kaj trans la oceanoj. La nereduktebla valoro de ĉiuj homoj, la insistado, ke ĉiu vivo estas valora, la baza kaj necesa koncepto, ke ni estas parto de unu homa familio, tio estas la rakonto, kiun ni ĉiuj devas rakonti.


Tial ni venis al Hiroŝima, por ke ni povu pensi pri homoj, kiujn ni amas, la unua rideto de niaj infanoj en la mateno, la milda tuŝo de edzino trans la kuireja tablo, la komforta brakumado de patrino. Ni povas pensi pri tiuj aferoj kaj scias,

ke tiuj samaj voloraj momentoj okazis ĉi tie, antaŭ 71 jaroj. Kiuj mortis, tiuj estas samaj kiel ni.

Ordinaraj homoj komprenas tion, mi opinias. Ili ne plu volas militon. Ili volas, ke la mirindaĵoj de la scienco fokusiĝu al plibonigo de la vivo kaj ne al ĝia eliminado. Kiam la elekto farita de nacioj, kiam la elekto farita de politikaj gvidantoj, reflektas tiun simplan saĝecon, tiam la leciono de Hiroŝima estas farita.

La mondo eterne ŝanĝiĝis ĉi tie. Sed hodiaŭ la infanoj de tiu ĉi urbo pasigas la tagojn en paco. Kiel valora afero tio estas! Tio estas protektenda, kaj etendenda al ĉiuj infanoj. Tio estas estonteco, kiun ni povas elekti, estonteco, en kiu Hiroŝima kaj Nagasaki estas konataj ne kiel “la tagiĝo de nuklea milito”, sed kiel la ekstarto de nia propra morala vekigo.

## Kio okazis rilate al nukleaj aferoj?



Ne venas raportoj el Koreio kaj Ĉinio pri nukleaj centraloj en tiuj landoj, do unuan fojon mi sciis, kie troviĝas nukleaj centraloj en Ĉinio kaj Koreio. Laŭ tiu ĉi artikolo troviĝas 20 nukleaj centraloj en Koreio kaj 31 en Ĉinio.

Japanio komencis prepari kontraŭteroristan rimedon, sed tio estas tute ne sufiĉa. Povos okazi, ke teroristoj eklaboros en la centraloj, montrante falsan identigilon, sed preventi tion estas malfacile, ĉar la ŝtato ne rajtas interveni en privataj kompanioj pri dungado.

Nun ofte Norda Koreio eksperimentas raketojn aŭ misilojn en la direkto al Usono. Se ili erare trafos japanajn nukleajn reaktorojn, okazos denove katastrofo, kiu detruos tutan Japanion.

### **Malnovaj reaktoroj komencos funkcii**

Laŭ la regulo, vivlongo de nuklea reaktoro estas 40 jaroj, sed kiel “malofta” escepto, oni povas unufoje plilongigi ĝin 20 jarojn pli. Kiam tiu regulo estis decidita, plilongigo devis esti “malofta”, sed la Nuklea Reguligada Aŭtoritato komencis tre facilanime plilonge vivigi malnovajn reaktorojn laŭ la premo de la registaro kaj la industria mondo. La 20-an de junio ĝi aprobis pliajn 20 jarojn da funkciigo al du reaktoroj 40-jaraj kaj 41-jaraj en Takahama en la gubernio Fukui. La du reaktoroj komencos funkcii post aŭtuno de 2019.

En Japanio troviĝas 20 reaktoroj pli ol 30-jaraj, el kiuj oni jam decidis forĵeti 6 malgrandajn reaktorojn. Por aprobigi plilongigon de la vivo de tiuj reaktoroj, oni devos elspezi multege da mono por riparado, kaj tio ne donos profiton al la kompanioj. Tamen pri aliaj pli grandaj reaktoroj la elektraj kompanioj intencas peti plilongigon.

Forĵeti reaktoron mem estas malfacile kaj multekoste. La elektra kompanio Kjuuŝuu decidis forĵeti sian reaktoron en Genkai. Por finforĵeti ĝin, oni bezonos 28 jarojn kaj 36,4 miliardojn da enoj (364 milionojn da eŭroj). Kien forĵeti radioaktive poluitajn betonaĵojn kaj metalaĵojn estas alia problemo. Japanio estas malgranda lando kun multe da homoj, do nenie

estas senhoma loko, kie oni povos konservi tiujn poluitaĵojn.

## **Funkciantaj reaktoroj haltis**

En Takahama funkciis tria kaj kvara reaktoroj. La 9-an de marto la tribunalo de Oocu en la gubernio Ŝiga verdiktis, ke tiuj reaktoroj haltu. La plej granda kialo por tiu verdikto estis, ke la klarigo pri sekureco de la reaktoroj fare de la elektra kompanio Kansai ne estas sufiĉa kaj ke la



novaj reguloj pri funkciigo de reaktoroj ne estas akcepteblaj, kiam oni konsideras la gravan akcidenton en Fukuŝima, kies kaŭzoj ankoraŭ ne estas klaraj. Laŭ tiu verdikto la du funkciantaj reaktoroj haltis la 10-an de marto. Tio estas granda venko por la kontraŭnukleenergia movado.

Pri tiu verdikto s-ro Ido Keniĉi, eksa juĝisto kaj nun advokato por la akuzantoj, klarigas jene:

Kiam oni funkciigas reaktorojn, oni devas observi la internacian normon, nome kvin-tavolan protektadon: 1. ne okazu akcidentoj, 2. ne okazu gravaj akcidentoj, 3. ne lasu akcidenton serveriĝi, 4. minimumu severan akcidenton, 5. protektu loĝantojn kontraŭ elĵetiĝantaj radioaktivaĵoj per taŭgaj evakuplanoj.

Antaŭ la akcidento en Fukuŝima ne ekzistis la lastaj du tavoloj en Japanio, ĉar oni kredis, ke en Japanio ne okazos severaj akcidentoj. Post la akcidento oni enkondukis la lastajn du tavolojn, sed la Nuklea Reguligada Aŭtoritato aprobas funkciigon de reaktoro, ne diskutante pri tiuj du, ĉar tiuj ne estas inkluditaj en la ekzamenendaj eroj. La verdikto diras, ke tiu sinteno de la Aŭtoritato ne estas taŭga kaj la ŝtato memrespondece planu evakuplanon.

La elektraj kompanioj volegas refunkciigi reaktorojn, nur por sia profito, ne por bono de la popolanoj. La kaŭzoj de la akcidento en Fukuŝima ankoraŭ ne estas klaraj, pli ol 100 000 homoj ankoraŭ rifuĝante vivas malfacile en kaj ekster Fukuŝima, kaj pli ol 2000 homoj mortis pro rilataj kaŭzoj. Por la profito de privataj kompanioj, ĉu oni rajtas faligi multegajn homojn en la inferon kaj okazigi aliajn severajn akcidentojn kaj pereigi Japanion? Ni solidare batalu kontraŭ la registaro kaj la industria mondo, kiuj antaŭenpuŝas nukle-ergian politikon.

Poste la kompanio metis la aferon al la sama juĝejo por nuligi la antaŭan verdikton, sed la 17-an de junio la sama juĝisto Jamamoto Joŝihiko rifuzis akcepti la postulon. Antaŭe preskaŭ ĉiuj juĝistoj juĝis la nukleajn aferojn laŭ la volo de la registaro, sed post la akcidento en Fukuŝima ekaperis sinceraj juĝistoj kaj skribas verdikton por la popolanoj.

Sed ankoraŭ troviĝas malsinceraj juĝistoj kiuj verdiktas por la registaro kaj la elektraj kompanioj. La 6-an de aprilo la juĝejo de Fukuoka verdiktis aprobon de funkciigo de la unua kaj dua reaktoroj de Sendai en gubernio Kagoŝima, dirante, ke la novaj reguloj pri reaktoroj kaj la decido de la Aŭtoritato enhavas nenion malracian. La verdikto eĉ diris, ke postuli absolutan sekurecon ne estas ĝenerala opinio.

Plejmultaj japanoj timas denovan akcidenton kaj kontraŭas la refunkciigon de la reaktoroj. Tio estas la ĝenerala opinio. Tiuj juĝistoj perfidis la popolanojn, verkante tiun stultan verdikton flatantan la registaron.

## **Kvalit-rekono por Esperanto-instruado**

*La Esperanto-instruado en la Jagelona Universitato ricevis internacian nemovadan kvalit-rekonon de EAQUALS. La agado de tiu organizaĵo interesos esperantistojn de ĉiuj kontinentoj.*

EAQUALS estas internacia organizaĵo pri plej altaj kvalit-normoj en

instruado de fremdaj lingvoj. Ĝi estas registrita en Britio. EAQUALS konfirmas altan kvaliton de la instru-lerna procezo rigardata tutece, kiel instruado, ekzamenado, lernado kaj multaj aliaj gravaj elementoj ligitaj kun lingvoinstruado.

EAQUALS partoprenas en laboroj de la Konsilio de Eŭropo, ĝi ankaŭ estas konsultata de la Eŭropa Komisiono pri aferoj rilataj al lingva edukado.

En la Jagelona Universitato estas instruataj pli-malpli 100 fremdaj lingvoj, sed 11, inter ili Esperanto, estas plej larĝe disponigataj en la granda fremdlingva fako de la universitato, kiu nomiĝas Jagelona Lingva Centro. Nur tiuj lingvoj celis (laŭ la rekomendo kaj kun forta apogo de la Rektoro) kaj akiris la Eaquals-kvalifikon.

La Esperanto-instruado en la universitato havas oficialan statuson, tial la altegan koston de la akredito pagis, kompreneble, la universitato.



## **La signifo por Pollando**

La Jagelona Universitato estas la unua universitato en Pollando, kies lingvoinstruado ricevis tiun prestiĝan kvalit-markon. Tiu fakto malfermas la vojon al la fremdlingvaj fakoj de aliaj polaj universitatoj. Jam kelkaj petis ĉi-rilatan helpon de la Jagelona Universitato.



## La graveco por Esperanto

1. Laŭ konataj dokumentoj, la Jagelona Universitato estas la sola mondscale (kaj verŝajne la unua) supera lernejo, kies Esperanto-instruado havas la internacian Equals-markon (de iom pli longa tempo slogano de la Jagelona Lingva Centro estas “Ni estas aliaj”). Esperanto troviĝas en la listo de la 30 lingvoj, kies instruado akiris ie en la mondo la prestiĝan Equals-kvaliton. Tio estas grava por Esperanto, ĉar montras, ke
  - a) la lingvo povas esti traktata tute same, kiel aliaj, etnaj lingvoj, kaj ke
  - b) ĝia instruado povas atingi saman, internacie rekonatan nivelon kiel la angla, germana k.a.
2. Esperanto estas pli facile akceptebla en internaciaj fakaj medioj, se proponas ĝin granda ŝtata universitato.
3. La fakto de la bazita sur la plej modernaj normoj internacia rekono de la Esperanto-instruado, kiu jam realiĝis en granda universitato, povas malfermi la vojon al movadaj institucioj instruantaj Esperanton.
4. La akiro de la internacia rekono de alta kvalito en lingvoinstruado estas konsiderata en la plej bona pola universitato kiel granda sukceso, kaj jam kelkajn monatojn daŭras festo...

Ekde nun la oficialaj atestiloj kaj konfirmiloj de la Jagelona Universitato pri Esperanto kaj pri aliaj lingvoj enhavos la markon de la internacia EAQUALS-kvalito.

Baldaŭ komenciĝos nova, mallonga internacia Esperanto-kurso en Interreto.

*Maria Majerczak*



*Fotoj el la 101-a Universala Kongreso en Nitra, Slovakio. Supre la nacia vespero, sube manifestacio de la kongresanoj en la urbo.*

